

Heinrich Heine,
Lorelej

*tradukita de Ludwig
Lazarus Zamenhof*

Heinrich Heine,
Lorelej'

*tradukita de Leopold
Elb*

Heinrich Heine,
Lorelejo

*tradukita de Joachim
Gießner*

Heinrich Heine,
Lurleia

tradukita de N. N. 01

Tiu traduko estas poste iom modifita de aliujoj, ne estas la origina traduk-versio de Leopold Elb.

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l'sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

...

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiga la melodi'.

...

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre kabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

...

Ignoro, quid id sibi velit,
Tristissimus cur sim,
Antiqui aevi fabellam
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,
Et Rhenus leniter it,
Cacumen montis lucescit,
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis
Virgo pulcherrima,
Auro nitet gemma frontis,
Se petit auricoma.

Aureolo pectine pectit,
Carmen canens procul,
Mirandum id habet modum
Nec non virilem simul.

...

Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ektremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu dangĝero rigardas li al la kantan- to.	Kaj sopiregon eksen- tas Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci'. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!	In cymba navitam mille Angores feri tenent, Non videt scopulos il- le, Ocli non si sursum vi- dent.
--	--	--	---

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvotur- nado; ĝin Lorelej' faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Ĝis tiras kun si al Rejn- fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la pro- fundo pro Loreleja kantad'.	Opinor undas de- vorare Nautam cum navicu- la, Effecit solo canendo Lurleia id dea.
--	--	--	--

*Traduko de la Germa-
na poemo "Die Lore-
lei" de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 - †1856-
02-17) en Esperanton de
LUDWIG LAZARUS ZA-
MENHOF (Ludoviko La-
zaro Zamenhofo, *1859-
12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30
16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi
prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germa-
na poemo "Die Lore-
lei" de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 - †1856-
02-17) en Esperanton de
LEOPOLD ELB (†1912-
08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03
19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur
paĝo 84 de la lernoli-
bro „Post la kurso“ de
Wilhelm kaj Hans Win-
gen, eldonita de Lud-
wig Pickel en Nurember-
go (Nürnberg), Germa-
nio.*

*Traduko de la Germana
poemo "Die Lorelei"
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 - †1856-
02-17) en Esperanton
de JOACHIM GIESSNER
(*1913-12-23 - †2003-
11-25).*

*Arg-2-1115 (2010-09-15
12:51:51)*

*Tiu ĉi poem-traduko
aperis en la kant-kolekto
"Mia kantaro I", eldonita
de Josef Schiffer (Wil-
storfstr. 58, D-78050
Villingen-Schwenningen,
Germanio, tel.
0049(0)7721-58991;
faks. 0049(0)7721-
508891, ret-adreso:
Josef.Schiffer@
t-online.de), n-ro
30. Krome ĝi aperis en
la informilo "Fervoja Es-
perantisto" de Germana
Ferjojista Esperanto-
Asocio, n-ro 3/2010, sur
paĝo 3.*

*Traduko de la Germa-
na poemo "Die Lorelei"
de HEINRICH HEINE
(*1797-12-13 - †1856-
02-17) en la Latinan de
N. N. 01.*

*Arg-2-179 (2010-02-11
14:00:52)*